



**5(159)
2016**

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Elżbieta Zechenter-Spławińska

Kossakówka

W Twoim ogrodzie, Lilko*
już nie rosną róże
matka natura znacznie mniej
ma do roboty
niż kiedy w nim śpiewały słowiki
a kotka przy jej pomocy
miała urodzić kocięta

Wtedy z pracowni Tatki**
widziałaś Bielany
i patrzyłaś na Wisłę
gdy tonęło słońce

Ogród zarósł blokami
zabrały mu niebo
choć nie tylko jest ptakom niezbędny
i chmurom

*Lilka – poetka Maria Pawlikowska-Jasnorzewska,
z domu Kossakówna
**Tatko – wybitny malarz batalista Wojciech Kossak

Ewa Elżbieta Nowakowska

Decydują

Furtka prowadząca
na kirkut Remu
ma klamkę tylko
od wewnątrz

To umarli decydują
kogo wpuścić

Kossak-vilao

En via ĝardeno, Lilka*
jam ne kreskas rozoj
patrino naturo rimarkeble havas
maleli da laboro
ol tiam kiam en ĝi kantis najtingaloj
kaj katino ĉe ŝia helpo
celis naski idojn

Tiam el laborejo de Paĉjo**
vi vidis Bjelanojn
kaj rigardis Vistulon
kiam dronis la suno

La ĝardeno surkreskis per blokoj
ili forprenis al ĝi la ĉielon
kvankam ne nur al birdoj ĝi estas necesa
kaj al nuboj

*Lilka – poetino Maria Pawlikowska-Jasnorzewska,
naskita Kossak
** Paĉjo – elstara batal-pentristo Wojciech
Kossak

Ili decidas

Pordeto kondukanta
al juda tombejo Remu
havas klinkom nur
de ene

Jen mortintoj decidas
kiun enlasi

tradukis Lidia Ligęza

Ni imitu la spertulojn

De la 3-a ĝis la 5-a de junio en Krakovo okazis jam 30-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo. La organizantoj de Krakova Societo ESPERANTO, ĉefe Lidia Ligeza, Grażyna Porada preparis altnivelan aranĝon zorgante pri ĉiu detalo. La programo estis perfekte pripensita kaj realigita. La organizantoj kiel kutime zorgis, por ke la publiko ne enuiĝu rigardante programerojn konatajn de multaj aliaj E-aranĝoj.

La jubilea aranĝo okazis en Kulturdomo „Podgórze”, ĉe la strato Sokolska 13. Irante al la prelegsalono ni povis admiri precize kaj bele preparitan fotoekspozicion de Adam Wilkus, kiu estis dediĉita al la elstara esperanta aktorino Jadwiga Gibczyńska, pri kiu li ankaŭ prelegis.

Tuj post la inaŭguro „Skizon pri agado de KSE” prezentis Alicja Sacha laŭ materialoj en kroniko kaj artikoloj de elstara, bedaŭrinde nevivanta krakova esperantisto Marian Kostecki.

Andrzej Kołpanowicz prelegis pri Jan Matejko, la plej fama pola pentristo de historiaj eventoj kaj bataloj. Li kompletigis nian scion pri la artpentristo je detaloj absolute nekonataj al vasta publiko.

Esperantajn vortarojn ĝeneralajn kaj sciencajn priparolis Adam Łomnicki. La prezentitaj analizoj okazis tre interesaj kaj pensigaj. Magdalena Tatara proksimigis kaj profundigis la esperantan sportan vortprovizon. La prelego estis kompletigita per plurmedia prezentado de bildoj ilustrantaj priparolataj nocioj.

Pri antikvaĵoj de la Krzeszowice-Tero interese rakontis Zbigniew Duda. Ĉiuj aŭskultantoj post ĉi prelego tutcerte volonte vizitos priparolitajn lokojn.

Tomasz Chmielik sian prelegon dediĉis al la urbeto Chełm, kiu antaŭ holokaŭsto estis simbolo de „malsaĝula urbeto” en pola humura literaturo de judoj. La prelego ĉefe estis apogita je „Rakontoj el Ĥelmo” de Menaĥem Kipnis.

Lidia Ligeza interese priparolis finsolvojn rilatantajn al nomoj kaj sakroj en propraj tradukoj el du dramoj de Stanisław Ignacy Witkiewicz (Witkacy) „En la eta biendomo” kaj „Ŝuistoj”. Esperanta versio de la menciitaj proponoj estis por la ĉeestantoj amuza kaj ridvoka.

Piotr Nosek invitis la publikon viziti preskaŭ tutan mondon, kiun li ekkonis ĉiĉeronante multajn ekskursojn. La prelego estis valora plurmedia prezento de ekzotikaj lokoj.

La gasto el Bjalistoko Elżbieta Karczewska prezentis du tre interesajn programerojn, pli seriozan „Esperanto sur la pola listo de nemateria kultura heredaĵo” kaj bildige, belesperante rakontitan relacion pri la ekskurso al Nepalo. Ni ĝoju, ke ankoraŭfoje oni rememorigis al ni la gravan fakton, ke Pollando duoble kontribuis en ĉi kulture heredaĵon, kiel lulilo de Esperanto kaj kiel gardanto de esperantaj tradicioj.

Markéta kaj Adam Wilkus rakontis pri la Sveda E-Kongreso sur la pola marbordo. Tiu plurmedia prezento estis farita tre zorgeme kaj la partoprenantoj povis senti sin kvazaŭ ĉeestantoj de ĉemara internacia kongreso.

Dum la jubilea aranĝo ne mankis ankaŭ promocio. Tomasz Chmielik promociis la romanon „Pupo” de Bolesław Prus en la propra traduko esperanten. Ĉi tiu grandioza laboro fruktis per 660-paĝa librego. Aperigis ĝin Podlaĥia Biblioteko en Bjalistoko kunlabore kun Libro-Mondo Świdnik kaj Dokumenta Esperanto-Centro en Ĝurđevac. Aŭtoro de okulfrapa kaj bela kovrilo estas Przemysław Wierzbowski.

Netipan programeron proponis al ni Anastazja Daĉela kaj Grażyna Porada, kiuj aranĝis prezentadon de Betterware sub titolo „Suplementoj de dieto”. Krom gravaj informoj pri firmaaj produktoj oni povis gustumi sukajn de Mega Life kaj surloke faritajn per elpremilo Kuvings sukajn el pomoj, oranĝoj, betoj, karotoj, tomatoj, celerioj, sabeliko kun diversaj herboj en diversaj kombinoj.

La organizantoj zorgis ankaŭ pri altnivela arta programo. La vendreda vespero estis dediĉita al muzikkoncerto de 26-persona norvega blovorkestro Roros Janitsjarorkester. Viglaj ritmoj instigis nin piedfrapi kaj preskaŭ danci. Brile elpaŝis la orkestrestro ludante solaĵon persaksofone.

Esprimplene montris siajn emociojn la krakova aktorino Anna Ramza pentrante bildojn en imagpovo de la publiko dum recitado de poemoj pri Krakovo. Melodioj de konataj krakovaj kantoj ŝi interrompe ludis fortepiane.

Krome la publiko povis aŭskulti belan klasikan muzikon, kiun plenumis gefratoj, Julia kaj Joachim Kołpanowicz.

La lasta akcento de la sabata aranĝo estis speciale preparita koncerto, apogita je „Kanto pri la tero nia” de Wincenty Pol. Jaga Wrońska verve kaj sperte plenumis kanzonojn, Irena Urbańska recitis tekstojn ankaŭ esperantlingve. La tuton ornamis per bona fortepiana akompano Jacek Bylica. La publiko akceptis la koncerton kun kortuŝo kaj forta aplaŭdo.

Matenan dimanĉan promenon tra centro de Krakovo sperte gvidis Jan Dziura. De Matejko-placo la partoprenantoj trairis ĉirkaŭaĵon de Barbakano, straton Floriańska, Ĉefplacon, straton Bracka kaj atingis preĝejon de Fratoj Franciskanoj, kie en Itala Kapelo okazis la Esperanta Sankta Meso. Celebris ĝin animzorganto de esperantistoj pastro Roman Gmyrek, kiu feliĉe povis rezigni de siaj dimanĉaj devoj en apudĉenstoĥova paroĥejo kaj veni.

De la preĝejo laŭ Grodzka-strato ni atingis Palacon de Episkopo Erazm Ciołek, filion de la Nacia Muzeo. Survoje ni renkontis grandiozan paradon de drakoj. Fariĝis nova kutimo aranĝi marŝon de multnombraj figuroj de pli grandaj kaj malpli grandaj drakoj okaze de la urba festo, kiun oni solenas la 5-an de junio dum la datreveno lokigi en Krakovo la urbon laŭ la magdeburga leĝo. Memkompreneble la afero apogas je konata legendo pri drako, kiu loĝis en vavela groto apud Vistulo. Atinginte la planitan lokon ni vizitis riĉan galerion de la ortodoksa arto. La vizitadon plifaciligis prilaborita esperantlingve de Lidia Ligeża preparita speciale por la aranĝo 15-paĝa broŝuro pri la arigitaj objektoj.

La publiko estis ravita pro la neforgesebla etoso de la tuta aranĝo. La Esperantaj Tagoj de Krakovo ĉiam enkondukas pozitivan energion kaj pliigas senton de harmonio en nian vivon. Jam kun granda malpacienco oni atendas la sekvajn, la 31-ajn Esperantaj Tagoj de Krakovo.

Malgosia Komarnicka
(Centro de Interkultura Edukado – Vroclavo)

Ikono

Ikono en la bizanca kaj orient-kristanisma arto estas bildo prezentanta la sanktajn personojn – Kriston, Dipatrinon, evangelistojn, apostolojn, patrojn de la eklezio, arkianĝelojn, bibliajn liturgiajn kaj simbolajn scenojn.

Ikonoj estis pentritaj ĉefe sur ligno aŭ tolo per tempera aŭ enkaŭstika teknikoj, rare oni faris ilin kiel reliefoj el ligno aŭ marmoro, ankaŭ materialoj por ili estis steatito kaj emajlo. Ikonoj pentritaj sur lignaj tabuloj havis elstarantajn randumojn, sur kiuj oni pentris scenojn el vivo de la sanktulo vidigita sur la bildo.

La plej malnovaj ikonoj estis ne unufoje ornamitaj per multekostaj juveloj, en tempoperiodoj pli malfruaj, precipe de la XVI-a jarcento. oni aplikis dekorajn forĝaĵojn el la ora aŭ arĝenta lado kovrantajn la tutan bildon escepte de vizaĝo kaj manoj.

Deveno de ikono ligiĝas kun tradicioj de la malfruantikva pentroarto, precipe kun arto de portreto kaj la plej malnovaj ikonoj, kiuj konserviĝis, montras spurojn de portretoj el egipta Fajum. Ikonoj montras statikan pritrakton de la temo kaj substrekadon de la spiritalaj valoroj ĉe la pentrata persono.

Ideo de ikono strikte ligiĝas kun difinita religia koncepto: kiel la sankta bildo ĝi estas rime-do, kiu pere de la preĝa kontemplacio ebligas ligon de homo kun Dio, kaj eĉ ĝi mem konstituas iun konkretigon de dieco, kiu estas inda la dian adoron. Ĉi tiu koncepto alportis simptomajn rezultojn – ĝi sugestis foriron de iluziismo kaj samtempe alproksimiĝon al abstraktismo, sed ankaŭ igis kulton, kiu alproksimiĝis al idolkulto. Ĉi tio fariĝis kaŭzo de ikonoklastaj bataloj en VIII kaj IX jarcentoj, kiuj finiĝis en 843 j. pro restituo de la kulto ne por la bildoj mem, sed por personoj sur ili vidigitaj.

Konserviĝis ĉe tio principo de fideleco al tradiciaj pramodeloj, kiuj fariĝis kanonoj. Do oni komprenas disvastigon en spaco de la bizanca kulturo lernolibrojn por pentristoj, kiuj ampleksis precizajn regulojn ikonografiajn kaj teknikajn.

Lidia Ligeża